


SUDFRANCIA STELO

N° 205 – 2a kvaronjaro 2013 - 2^{ème} trimestre 2013



*Bulteno eldonita de la
Esperanto-Federacio
de Langvedoko-
Rusiljono*



Sudfrancia
stelo

Enhavo:

P 2 : bureau 2/05
P 3 : Vivo de la grupoj
P 11 : el nia esperantista
mondo : pétition
P13 : esperanto & front
populaire
P 16 : Helpu ni : esperanto +
P 18 : Seiki & Collin pentristoj
P20 : iuj paŝis sur la luno



Lasta kunveno en Paulhan por la CBE



Forpasis George, tie kun Daniel & José

REABONNEMENT : Pour recevoir la **version papier**, pensez à vous (ré)abonner : tarif 10€ incluant la cotisation à la fédération à envoyer à Martine Ragonnet 2 rue Lepic, A62 34070 Montpellier. Pour recevoir dès parution la **version numérique** par internet : Cotisation à la fédération 2€ à envoyer à martine.ragonnet@orange.fr

Site de la fédération : <http://esperanto-languedoc-roussillon.fr>

Envoyer les contributions au site à : oli.manfredi@laposte.net

Et celle du SFS (idées, photos, articles, nouvelles,...) à Martine Ragonnet

2, rue Lepic A62 34070 MONTPELLIER, martine.ragonnet@orange.fr

Comité de relecture : Josée BOCCADIFUOCO, Marie-Blanche FONDRILLON, Jeanine BONY

Compte rendu de la réunion de bureau du 22 mai 2013

Statuts

Nous relisons et modifions des statuts dans le sens de leur simplification.

Compte bancaire

La présidente et la trésorière vont demander le transfert du compte à la Banque postale de Lunel à Montpellier et déposer leur signature.

Formalités administratives

Le secrétaire renvoie la déclaration de modification du bureau à la Préfecture de l'Hérault avec le procès verbal de l'assemblée générale.

Sud Francia Stelo

Martine se charge de collecter les informations et de les mettre en forme. Monique se charge de faire photocopier les SFS et de les envoyer.

Il faut que les groupes prennent en charge la mise à jour des adresses des abonnés. Le groupe de Nîmes va envoyer à la responsable de SFS des planches de « Iuj paŝis sur la Luno » pour publication en prenant toutes les précautions nécessaires vis à vis des Editions Casterman, & des poèmes.

Un sondage sera fait auprès des lecteurs pour connaître leur souhait sur le contenu du bulletin.

Pour SFS, on pourrait utiliser le logiciel de mise en page Scribus. Olivier s'occupe du site Internet de la Fédération. Il faut le faire vivre. Il se prête plus particulièrement à la diffusion de photos.

Quels événements pouvons-nous organiser en 2014 ?

- Ressusciter la semaine de Sète ? Cela nécessite de l'énergie, des disponibilités humaines qui semblent manquer dans la fédération.

- Un événement culturel plus modeste? Pourquoi pas un week-end avec une personnalité invitée ?

Prochaine réunion à la rentrée, avant la nouvelle rencontre fédérale à Nîmes, le 12 octobre.

Vous participerez à une rencontre, un congrès pendant cet été, n'oubliez pas de nous envoyer vos impressions !

Date limite des contributions pour le prochain numéro : 12 septembre



Vivo de la grupoj ...

En Béziers : Kunveno en Paulhan

Tiun ĉi jaron, la jarfina kunveno de la CBE okazis ĉe Pierre Taupiac en Paulhan. Ni estis 15. La vetero estis belega nek tro varma nek tro malvarma, delectinda.

Ni komencis tiun gajan tagon per la vilaĝa vizito. Pierre petis de Andrée Audemar, loka historema tie naskiĝinta, nin konduki por malkovri tiun ĉarman rondirvojan vilaĝon, konstruitan sur loko de roma vilaĝo Paulus.

Ni iradis tra la mallarĝaj vojoj ĝis la vestigoj de malnova kastelo. Vidalvide dentegojn elmontrante hundo rigardante la kastelon atendis nin (ceramikaĵo rande la tegmento). Laŭ la rakonto, ĝi estis tie postsinistra duelo, por diri al kastelestro : « Alvenos tago, kiam mi mordos tiun, kiu mordis min » ? Poste ni supreniris ĝis la kapelo « *Notre-Dame des Vertus* » brue de la sonorilo. Francie, estas unu el la 3 plej malnovaj (1414) funkciantaj sonoriloj. Eble « *Notre-Dame des Vertus* » estas konstruita surloke de antikva templo dediĉita al la diino de la grenrikoltoj.

Pasia de ezoterismo nia gvidantino klarigis kaj perceptigis al ni la radiadojn pozitivajn kaj malpozitivajn, kiuj agas laŭ la enteraj fluoj kaj la subteraj akvoj en tiu magica loko. Ni plenumis nin per energio kaj supreniris ĝis Pjerdomo soifantaj kaj malsataj. La manĝado daŭris en festa etoso kun multnombraj liberigitaj krokodiloj.

Dankon al Marthe kaj Pierre pri ilia kora akcepto.

Laurence & Marie Blanche

Ĝis la 7a

De septembro !



Ker Ekzameno por Marie Blanche

Laŭ la preskribo de la Eŭropea Konsilio, individue, tiuj ekzamenoj utilas por motivi sian lernadon kaj konkrete taksu sian nivelon. Ili pli utilas por la lingvo mem: la KER ekzameno estas grava ŝtupo al plia rekono de Esperanto. Kreita de la Komuna Eŭropa Referenckadro, novtipa UEA-KER ekzameno moderna valora akceptata de laborinstancoj kaj lerninstitutoj difinas lingvo-konajn normojn.

La ekzamenantoj estos oficiale registrataj en Strasburgo ĉe la Eŭropa Konsilio.

Ekzameno: sabaton la 8^{an} de junio en Tuluzo.

La skriba parto de la Ker ekzameno komencas je la naŭa precize. Ĉiuj el ni devas ĉeesti duonhoron pli frue. Tiam, Patrice Buyssières vicprezidanto de Tuluzo universitato, honora patrono de la sesio malsigelas la kovertojn de la diversaj temoj. Ni laboras kune ĉe unu tablo: nivelo B1 blua papero, B2 flava kaj C1 verda. Por la C1 la taskoj estas gramatikaj ekzercoj, kompreno de skribita teksto (ĉu vere, ĉu false) letero: universala lingvo, ĉu utila? komentario de teksto: dum kunveno estas decidata kune, ke la viandomanĝuloj pagos imposton.

Demando de mi: ĉu la viandemuloj pagos, ĉu ili rezignos?

Por C1 la tempo estas 4 horoj. Mi finis post 3 horoj kaj relegis miajn respondojn dum duonhoron. Nun mi havas liberan tempon por manĝeti antaŭ la aŭskulta parto, kiu estas komuna parto el parola parto. Ni estas 3 C1. Ni aŭskultas dufoje kaj skribe ni respondas al la demandoj. Tio daŭras 40 minutojn. Tuj poste mi foriras por entrajniĝi.

Parola parto: vendredon la 21^{an} de junio

Post kelkaj malfacilaĵoj pro la horaroj de la ekzamenantoj kaj tiuj de la trajnoj, fine mi trapasos la parolan ekzamenon, la unua, je la 16 a. Kiam mi trovas la salonon, Kristof estas instalanta la komputilon. La ekzameno okazos skajpe. Bonŝance mi vidas la ekzamenantoj per granda ekrano Katalin Kavats Hungarino el Nederlando kaj Sofia el Germanio. Mi bone vidas kaj aŭdas Katalin sed nek vidas nek bone aŭdas Sofian. Unue mi parolas pri mi, pri la grupo, la kursoj, la eksterlandaj gastoj, la tradukitaj prelegoj. Poste mi priskribas bildon. Mi ne deziras la duan (ĝardennano kaj klasikaj statuoj), mi elektas la unuan: terase de kafejo, marbirdo pikpikas

malpuran tukon en pleto sur ronda tablo. Sofia demandas : « Ĉu vi ŝatas tion ? » mi diras « tute ne, mi timas birdojn, kiuj venas de supre ». Tuj poste mi lotumas paperon pri rolludo : Katalin estas mia edzo, kiu ne deziras ferii en Naturo, kabano apud lageto. Lasta

tasko komentari tekston pri koloriloj en manĝaĵo.

Katalin diris : « estis tre agrabla paroli kun vi, espereble ni denove renkontiĝos. » Ĉion daŭris nur duonhoron sed poste mi ne plu vidas, aŭdas, pensas,... nur reveni hejmen...

Marie Blanche

Dates communiquée par le groupe de Florac :

Samedi **6 /07**, A.G. d'ESPERANTO-info. Dimanche **7/07** promenade aux Arcs de Saint Pierre sur le Causse Méjean. Rdv chez nous à 9 heures au col de Coperlac.
Samedi **20/07** à Chanac Lozère, stand à la fête, expo esperanto et activité esperanto.
Samedi 24 et dimanche 25 /08 stand à la fête des Travailleurs lozériens aux Ayres (Lozère). (Si des membres de la fédé hors Lozère veulent bien nous aider, nous les accueillerons chez nous pour les nuits.)
Samedi **7/09** stands à Florac et à Mende pour la journée des associations (Nous prévenir si vous voulez bien nous aider.)

Francis

Jean Marie & Marie Thérèse partoprenis:

Esperanto-Kongreso 4a-11a majo 2013, Artigues apud Bordojo



Dum pasantaj ferioj ni ĉeestis la kongreso de Internacia Fervojojista Esperanto-Federacio kaj de Esperanto-France.

La grava afero estis la ĝenerala kunsido de Esperanto-France ; tie la estraro prezentis la aktivecon raporton, la jarkonton, kaj la projektojn.... Inter tiuj mi retenis la revuon « Monde de l'esperanto » nur 8 € por tiu, kiu albonas la unua foje...

Ni veturis per TRAMO ĝis la urbo kaj ni vizitis ĝin piede : la kajojn kaj siajn butikojn, la sonorilegon de preskau sep tunoj !



1 la turo



Tramo & turo Pey-Berland

Ni suriris la ducent tridek unu ŝtupojn por atingi la supro de la turo Pey-Berland kie ni havis grandegvidon supre la urbo. Ni bedaŭris ke la muzeoj estis fermitaj... Ni ankoraŭ gustimis la bordvinon (*kun modereco*)

Ni ankoraŭ ŝatis la adiaŭan vesperon kun la kuntribuoj de la kongresanoj...

Agrablan restadon kun finvintra vetero...

Vendredon, ni ĉeestis al la prelegspektaklo INTERKANT, kiu gojis nin pri musikoj, kantoj, dansoj laŭ la tragediopero de Karmena... ĝis finfine TOREADOR'...Ole 🎵



Ni ŝatis, la koncerton de Kajto kiu ludis kaj kantis je humoraj (lokomotivo, rulu nun) *Zuf...!!!*



En Montpellier

Lasta monata kunveno 15an de Junio 2013

Jes, jam finiĝas la lerneja jaro 2013, kaj okaze de tiu M.K., ĉeestis nur 10 partoprenantoj !

Ho ve, ŝajne la esperantistoj en Montpellier iom laciĝas ?

Mi esperas ke, venontan jaron, ni estos akurataj kaj tro multnombraj en Escoutaire.

Tamen, tio ne malpermesis al ni paroli, paroladi, kaj al Thierry Saladin klarigi pri la mesaĝo de tiu junulo en Kostariko. La opinioj povas diversii, sed tiu junulo, laŭ mi, estas meritplena.

Thierry ankaŭ vendis Tĉemizojn rilate Esperanto kiel eŭropa lingvo .

Ni parolis pri la neĉeestantoj, kiuj jam ferias, kaj ni esperas vidi ilin eble dum la Foiro de Asocioj kiu

Esperanto-kurso en Montpeliero: raporto pri la ĵus pasinta jaro/ Andreo Hoaro

En Oktobro 2012 mi ekgvidis kurson por komencantoj en Montpeliero. Kvankam jam ekzistis kursoj, gvidataj de *Jeannine Bony* kaj *Joséphine Boccadifuoco*, tamen mi opiniis ties horarojn neoportunaj por laboristoj kaj studantoj. Post longa hezitado, reaj instigoj de pluraj esperantistaj kaj neesperantistaj

okazos la **8an de septembro** (kiel kutime en Antigone).

Mi petas al tiuj, kiuj pretos helpi okaze de tiu tago, bvl kontakti min aŭ Monique Eysseric, kaj ni bezonas fortajn brakojn, pli kaj pli (kial ? Be, pro maljunaj brakoj), mi rememorigas al vi mian telefon-n° 04 67 75 42 78.

Babilado alkondukis nin ĝis tagmeze, kaj tiun fojon ne estis tro da salitaj manĝaĵoj sed multaj kukoj !!

Ho, ne, ne, mi ne plendas, mi iomete ŝatas kukojn !!!

Jen do ni diras : ĝis la unua Monata Kunveno !

Belajn feriojn al vi ĉiuj

Josée

geamikoj finfine decidigis min ekgvidi kurson. Nu, mi do bezonis: ejon por instrui, metodon por instrui, kaj gelernantojn, al kiuj instrui.

Pri la ejo. — La ejon mi tre facile trovis danke al ano de la Esperanto-asocio de Montpeliero, Olivarbo. Li estas ano ankaŭ de anarĥiista asocio montpeliera, kiu nomiĝas « Centre Ascaso-Durruti ». Ĉi tiu asocio havas bibliotekon, en kiu troviĝas centoj

da libroj, en pluraj lingvoj, pri la liberecana movado. Ĝia celo estas disvastigi la liberecanajn ideojn. Ĉar Esperanto delonge estas parto de la liberecana movado, pensu, ekzemple, pri la gazeto *Senŝtatano*, kiu aperis komence de l' 20-a jarcento, aŭ pri la utiligo de Esperanto fare de la anarĥiista sindikato NKL (hispane *CNT*) dum la hispanaj revolucio kaj milito de l' 1930-aj jaroj, kaj ĉar mi mem estas liberecano, tial la anoj de la asocio tuj konsentis pri mia propono gvidi kurson en tiu memorplena, enhavriĉa ejo.

Tio tre gravas por mi, ĉar kvankam mi ne postulis ian ajn politikan tendencon de miaj gelernantoj, tamen mi tute ne kaŝis tion, ke mia utiligo de Esperanto profunde estas politika.

Tiel trovis mi taŭgan ejon por instrui.

Pri la metodo. — Antaŭ ĉi tiu kurso, mi neniam instruis. Mi longe hezitis, ĉar mi kredis, ke mi ne pretas, ke mia lingvo-nivelo ne sufiĉe altas. Sed pluraj Esperantistoj trafe komprenigis min, ke mi delonge pretas, kaj ke instruado estas tre bona maniero progresi. Pravaj ili tiam estis, kaj dankema mi nun estas. Nu, tamen, mankis al mi metodo. Mi do iom legis pri Esperanto-instruado, ĉefe

la tre interesan *Manlibron pri instruado de Esperanto* redaktitan de *Katalin Kováts*¹, kaj finfine elektis la faman Ĉe-metodon prezentitan en la libro *Baza Cseh-kurso*². Ĝin mi elektis, ĉar mi pensas, ke la malnov-stilaj, « gramatikaj » kursoj ja taŭgas por havi intelektan scion pri la lingvo, sed ne vere havigas al la gelernantoj parolkapablon.

Per rektaj metodoj, ili tuj aŭdas nur la cel-lingvon kaj tuj devas klopodi paroli kaj rekte pensi en ĝi. Mi iom timis ne kapabli adapti la metodon, sed ĉio glate iris: la etoso estis treege bona, ni multe ridis kaj la gelernantoj multe progresis, almenaŭ rilate la elparolon. La ĉefa problemo de tiu metodo estas tio, ke la rilatoj okazas preskaŭ nur inter la instruisto kaj la gelernantoj: plejofte, la instruisto demandas, kaj la gelernantoj (iom ŝafe) respondas. Tio ja povas taŭgi por veraj komencantoj — kiuj, kvankam sciantaj nenion pri la lingvo, tamen povas tuj ĝin paroli kaj al kutimiĝi al ties sonoj —, sed post kelkaj monatoj, mi nun pensas, ke la metodo devus iom aliigi: devus esti komunik-

1 Katalin Kováts (red.), *Manlibro pri instruado de Esperanto*, 3-a eldono, ILEI kaj E@I, 2009

2 Andreo Ĉe, *Baza Cseh-kurso*, 8-a eldono, Internacia Esperanto-Instituto, 1992

situacioj, legadoj kaj komentoj de tekstoj, de- kaj al-traduko, ktp. Se mi daŭrigus ĉi tiun kurson, tion mi certe farus, sed mi klopodus kiel eble plej ofte, se ne ĉiam, paroli en Esperanto. Tiel trovis mi (relative) taŭgan metodon por instrui.

Pri la gelernantoj. — La unuan lecionon ĉeestis pli ol dek homoj, kaj mi vere miregis pri tio, des pli, ke mi ne multe sciigis pri la kurso. Tamen geamikoj parolis pri ĝi, kaj scivolemuloj venis. Pluraj ne longe restis, kaj foriris ne klarigante, ĉe ne dirante, sian decidon. Pli-malpli diligente ĉeestis ses homoj, inter kiuj troviĝas du gelernantoj kaj kvar gestudentoj. La 1-an de Junio, ili trapasis la unuagradan ekzamenon. Pretaj ili nun estas por eniri la movadon, kaj malkovri, ĉu vere Esperanto diferencas de la aliaj lingvoj. Semis ni, nun rikoltu ili! Tiel mi estos trovinta taŭgajn gelernantojn...

Andreo



Kaj, kompreneble, post la kursoj...

Ekzamenoj 2013

Tiun unuan de junio okazis en la domo de Diana kaj Alice, la ekzamenoj unua grado .

La gepatroj de niaj amikinoj, metis je nia dispono, sian belan grandan domon, kie 6 gejunuloj venis por trapasi la ekzamenon. Ili komencis lerni Esperanton en oktobro 2013 kun Andreo . Li lernigis per la rekta metodo, kaj vere le rezulto estas mirinda !

Do je la 9a en la domo forlasita de gesinjoroj Richard, 6 gejunuloj altabliĝis por labori la skriban parton .

Diana kaj Andreo restis en la kuirejo por prepari la tagmanĝon . La etoso en la ekzamena ĉambro estis bona, ne tro da streĉo, do ĉio perfekte.

La gelernantoj donis la paĝojn de la skriba parto antaŭ la 12 an, do tri el ili povis trapasi la parolan parton, la tri aliaj faris tion post la tagmanĝo.

Andreo kaj Diana regalis nin per : legom'kukoj, salato, " reuniona " plado (rizo, lentoj, legomoj,,) kaj la deserto , " tiramisu " perfekte finiĝis tiu bongusta tagmanĝo . La kafo estis okazo babili kaj iom ripozi altablitaj en agrabla balkono ĉirkaŭita de plantoj, arboj...

La parola parto por la tri aliaj junuloj lasis al ni tempon por komenci la korektadon kiun ni daŭrigis pli malfrue en nia domo. Do nun ni atendas tiel senpacience kiel la ekzamenatoj, la rezulton de la ekzamenoj. Tamen ni povas diri, ke ni estis kontentaj de la laboro de ĉiuj gejunuloj kaj ni gratulas

Andreon pri liaj kursoj ! Atendante certe la duan gradan ekzamenon, ni diras al vi: **Gilles, Myriam, Alice, Marion, Jérémie, Sébastien**, bonajn somerajn feriojn kaj ĝis oktobro por la rezultoj !!
Josée



❖ *pli malbona novaĵo : la forpaso de **Georges Gonthier**...*

Josée verkis... **Kara amiko JORGO, karulo, karulo!**

Jam vi forlasis nin ! Via dezir-esprimo estas finfine plenumita ! Finfine, la doloroj lasis vin trankvila, post tiom kaj tiom da suferadaj jaroj. Nun vi estas libera, vi ŝvebas ie, ĉirkaŭ ni, sen iu ajn ligilo, nun vi estas libera, feliĉa !

Ĉi tie, ne ĉiuj bone konas vin, nur via filo Abdou, kiun ni devas dankegi, ĉar li, ĝis la fino, zorgis pri vi, kiel en sia tempo, ankaŭ vi, zorgis pri li. Vi havas bonan , ameman filon.

Mi konas vin nur de 15 jaroj, samtempe ni komencis lerni Esperanton, Jeannine multe nin helpis prepari la Kapablecan ekzamenon, kiun ni sukcesis samtempe kiel Jacqueline ! 15 jaroj, kiuj faris el ni Karulo kaj Karulino. Kiom da fojoj ni ludis geedzojn dum niaj lud-teatraĵoj !! Ni komencis per " mi volas novan ĉapelon ", poste, "ovoj", "Nikodemo", "Ĉe veterinaro", mi forgesas kelkajn, sed ne gravas, ĉiam ni akordiĝis por aldoni aŭ formeti tekston, ĉiam ni bone sukcesis fini niajn teatrumadojn, por la plezuro de la geamikoj, kaj la nia !

Via flanke, vi gvidis esperantajn kursojn, kaj multe zorgis pri kaj por Esperanto! Ĝis via lasta tago vi vizitis Lernu ĉiun tagon, neniam vi forlasis la Lingvon, Gratulojn al vi KARA.

Geamikoj : Hanna, Serge, Monique, Jeannine, Claudine, kiam eblis, ni vizitis vin. Via flanke, preskaŭ ĉiun tagon, vi telefonis por babilo kaj doni novaĵojn pri unu aŭ alia.

Mi ne plu aŭdos vian belegan voĉon , Ho , Ve !!!

Abdou, nun, Jorgo ne plu estas apud vi, sed ne hezitu alvoki nin, se vi bezonos helpon aŭ ion alian, eĉ nur por paroli, ĉiam vi trovos nin, ĉu bone, Abdou ?

Ĉiuj geesperantistoj, kiuj ne povis veni, en tiu momento forte pensas pri vi kaj por ĉiam vi estos en nia koro.

Karulo, mi ne adiaŭas, al vi, nur diras kial ne, ĜIS, KARULO !

Kuraĝon al vi Abdou !!!

En nia esperantista mondo... L'esperanto langue officielle de l'UE...

Une pétition au titre provocateur vient d'être lancée sur Internet au début du mois de février 2013. Elle a pour but d'inciter les institutions européennes à non seulement reconnaître l'esperanto — il serait temps, en effet ! — comme une langue digne de respect au même titre que d'autres langues construites, certes dans une proportion moindre mais parfaitement reconnues, celles-là, comme le sont l'hébreu moderne et l'indonésien, mais par surcroît lui donner le statut de langue officielle de l'Union européenne. Oui, vous avez bien lu, son titre est : **« L'Espéranto, langue officielle de l'Union européenne, maintenant ! »** Rien que ça !

Cette pétition ?

Eh bien oui, elle est née d'un rêve, celui d'un adolescent de seize ans qui de son lycée au Costa Rica a eu l'audace, pour ne pas dire le culot, que seule la jeunesse peut justifier, de lancer au monde ce défi. Parfaitement, un défi au monde entier ! En effet, le texte de sa pétition est le suivant :



« Nous, citoyens européens et du monde, nous vous appelons à faire de l'esperanto la 25ème langue de l'Union Européenne, pour une Europe plus démocratique et plus équitable vis-à-vis de chaque langue et culture du continent. Choisir l'esperanto, c'est un pas de plus dans la construction européenne. Il manque un débat au niveau européen, l'Europe ne doit pas seulement être économique, elle doit aussi être l'Europe des peuples. »

« Et que ça saute ! » a-t-on envie d'ajouter.

On ne peut s'empêcher de faire le parallèle avec la naissance de l'esperanto en 1887.

Quant à Joannès, puisque c'est de lui qu'il s'agit, il était encore il y a deux mois totalement inconnu du mouvement esperantiste. Lui aussi a fait un rêve. Un rêve semblable à celui que fit son illustre prédécesseur. Et de son lycée franco-costaricien où il prépare son baccalauréat, il nous interpelle tous.

Thierry Saladin

Aujourd'hui, le compteur est à 5467 signatures (4 juillet).

La pétition est pour l'instant accessible directement en dix langues seulement (Ar, De, En, Es, Fr, It, Jp, Kr, Po, Ru). C'est le maximum que permet Avaaz à ce jour. Toutes les autres langues (22 actuellement disponibles) sont donc sur la page d'accueil en français :

http://www.avaaz.org/fr/petition/Esperanto_langue_officielle_de_lUE/

Cette pétition suscite un débat... passionné !

- ✓ Pour Véronique Bichon, de Béziers, qui a entendu une partie de la conférence de T. Saladin à Artigues lors du congrès UFE, des réserves :

« Kiam mi vidis kaj aŭdis tion, mi pensis pri refaro de la subskribo «Espéranto au bac», interasocia projekto inter Esperanto France kaj SAT-Amikaro sed malpli bone farita :

Unue la elektitaj vortoj por la subskribo : «Esperanto, oficiala lingvo de Eŭropa Unio, nun!» Tamen Thierry Saladin parolas pri longdaŭra agado, eble pluraj jardekoj, ĝis kiam ĝi estos akirinta plurajn centmilojn da subskriboj ?

La petskribo estis lanĉita sen iu ajn preparado, nur du aŭ tri homoj laboras pri ĝi sen interkonsento kun la naciaj asocioj.

Neniu pripensis la sekvon de la petskribo : en la nunaj instancoj de la Eŭropa Unio, neniu povos ricevi ĝin ĉar esperanto ne estas oficiala lingvo de iu ajn eŭropa lando.

Estas eŭropa problemo, sed homoj el la tuta mondo povas subskribi, kio signifas tion?

Por mi, la tuta afero estas senutila, eĉ se la ideo estas interesa. Mi persone ne perdos tempon kaj energion por subteni tian stulte faritan projekton ».

- ✓ À Montpellier, le groupe a accueilli Thierry lors de la monata kunveno du mois d'avril. Tous étaient intéressés et ont évoqué des prolongements pour diffuser largement cette pétition, par exemple en associant les groupes de nos villes jumelées, mais surtout en organisant des conférences pour évoquer ces questions de langues ; l'idée étant que même si c'est une action à long terme qui vient d'un jeune latino, tout ce qui permet d'avancer dans ce domaine est bon à prendre !

Alors....

Faites vous votre propre opinion, débattons en !

thierry_saladin@yahoo.fr & tuj.free.fr (le centre du projet).

Front populaire & Espéranto

Du 29 mai au 9 juin, se tenait au Pavillon populaire, à Montpellier, l'exposition « la Volonté de bonheur », témoignages photographiques du Front populaire 1934-1938. Une belle et passionnante exposition !

Surprise ! Laurence, la présidente du groupe de Béziers, y a constaté que l'étoile espérantiste s'arborait fièrement sur les tee-shirts des manifestants! (Photos de l'agence Trampus, recadrées)



Cette découverte m'a donné envie de rechercher d'autres images, en vain ! Mais il y avait une autre mine, ... ce site philatéliste & un article de David Avzaradel, dont je cherche aujourd'hui des images de flammes ou de timbres, affaire à suivre (amis philatélistes....) M@rtine

(http://apfi.philatelie.free.fr/pages/articl_orig/page3_6.htm) (Extraits)

A propos d'une flamme de propagande pour l'Exposition de 1937

*Je voudrais que dans tous les villages et dans toutes
les villes on enseigne l'espéranto*

Léon Blum

« PARIS / INVITAS VIN /
EKSPOZICIO 1937 ».

Les amateurs de marques postales connaissent bien cette flamme temporaire, ne serait-ce qu'en raison du caractère inhabituel de sa formulation : le slogan en espéranto déroge à une règle qui veut que tout document

administratif soit rédigé en français. Notre flamme a été mise en service pendant quelques semaines seulement (du 12 mai au 31 août) dans le seul bureau de Paris VIII, 49 rue la Boétie. Une telle pièce relève certes du thème Espéranto.

Sans être rarissime, elle est difficile à se procurer.

Mais le contexte historique qui a entouré son emploi rend tout aussi évidente son insertion dans une collection consacrée au Front Populaire : depuis que les élections de mai 1936 ont amené à la Chambre une majorité de gauche, le cabinet Blum préside aux destinées de la France.

✓ Le Front Populaire et l'espéranto

Signe des Temps, à peine installé dans ses meubles, le nouveau gouvernement a honoré par le timbre la mémoire de Jean Jaurès. Or, Jaurès était un partisan déclaré de la langue auxiliaire internationale. Ses héritiers spirituels partagent cette sympathie.

Le 14 mai 1937, sous le haut patronage du Président Lebrun, se tient à Paris la Conférence internationale *Espéranto en moderna Vivo*, dotée d'un bureau de poste temporaire.

La conférence demande au gouvernement de rendre obligatoire l'enseignement de l'espéranto pour les enfants de 12 à 14 ans, dans le but à la fois d'améliorer l'enseignement de la langue maternelle et de faciliter l'apprentissage des langues étrangères.

Le Syndicat national des instituteurs étant arrivé aux mêmes

conclusions, le ministre Jean Zay autorise par une circulaire l'enseignement facultatif de l'espéranto dans les écoles, et ce dans le cadre des activités socio-éducatives, sous la conduite de maîtres bénévoles spécialisés. La République est pauvre et ménagère de ses deniers, mais ses bonnes intentions sont manifestes.

✓ La langue dangereuse

Prendre parti, dans les années 30, pour ou contre la « lingvo internacia » relève du politique. Nous sommes trop enclins aujourd'hui à oublier combien l'espéranto fut à sa naissance une idée « qui marchait », une idée dans le vent et dans le sens de l'Histoire.

Ecrivains, savants, philosophes, éducateurs, hommes d'affaires, ministres, tous les hommes de progrès de quelque bord qu'ils fussent, ceux qui croyaient au cinéma ou à la conquête de l'air, au désarmement général ou à l'élévation des masses, croyaient aussi en l'espéranto, et beaucoup adhéraient à sa morale.

Durement frappé en 1914 par l'explosion du conflit européen, puis en 1917 par la mort de son fondateur, le mouvement aura su, dès le début des années 20, reconstituer l'essentiel de ses positions. Mais l'Europe nouvelle, issue de traités inégaux, pétrie de rancœurs cloisonnée et

déséquilibrée, n'est pas l'espace de paix et de dialogue qu'avait rêvé Zamenhof.

Or, justement parce que l'espéranto représente toujours une force et un enjeu, il suscite aussi des méfiances et des haines. Les dictatures n'ont aucune raison de porter la langue internationale dans leur cœur. Alors que le Front Populaire triomphe en France, la guerre civile espagnole a commencé. En février 37, les nationalistes ont pris Malaga et fusillé tous les espérantophones du crû, coupables de crime. d'espérantiste. Voilà qui confère à notre flamme d'invitation un arrière-plan singulièrement dramatique.

La guerre d'Espagne n'est qu'un épisode. Au début de la décennie,

l'espéranto a perdu ses deux plus solides bastions sur le Vieux Continent, les terreaux où il croissait le mieux : chassé d'Allemagne par les nazis, il est également sur la touche en URSS où, après une lune de miel de six ans marquée par l'émission de plusieurs timbre-poste, la rupture a eu lieu, brutale, en 1931. En Russie, c'est désormais le temps des purges, des procès orchestrés par le pouvoir et au terme desquels il y a la prison, la déportation, la mort. L'espace européen de la langue internationale s'est rétréci comme peau de chagrin, il tend à sa confondre avec celui des démocraties parlementaires, elles-mêmes sur la brèche.

La France est devenue un refuge et un avant poste.



Bibliographie :

Rudolf BURMEISTER, Katalogo de Esperanto-poststampoj (1983),

Karl Marx Stadt (Chemnitz), éd. Elf-Arek, 1983

Gérard DREYFUS, Catalogue des Oblitérations mécaniques de France, éd. Yvert & Tellier, 1994

Jean-Pierre DUCLOYER, L'Espéranto : la clé retrouvée de la Tour de Babel,

s.l.n.d., photocopies d'une collection philatélique.

Helpu ni !

La projekto «**Esperanto Plus**» naskiĝis dank'al Jean-Pierre kaj Evelyne, konataj kiel gastigantoj de Esperanto-aranĝoj en Arrout (Ariège). Ili konstatis, ke ĉie en la mondo, mankas kompetentaj kaj disponeblaj instruistoj pri esperanto. Efektive, la tuta laboro estas senpaga, do la volontuloj bezonas trovi monrimedojn tutsimple por vivi. Tio limigas la homojn dediĉi sian tempon al disvolviĝo de esperanto. Tiu situacio estas ankoraŭ pli akra en regionoj kiel Afriko, kie la eblecoj perlabori estas nesufiĉaj aŭ eĉ neekzistantaj. Dume en Togolando ekzemple, estas relative multe da esperantistoj.

Kunlabora projekto

Konstatante la ege grandan diferencon inter deca salajro en tiuj landoj kaj en niaj, eblas krei grupojn de dek ĝis dek kvin homoj el riĉa lando pretaj donaci po 10 aŭ 15 eŭrojn monate por dungi esperantiston el malriĉa lando, tiel ke li/ŝi povus dece perlabori kaj efike disvastigi esperanton en sia lando. Tiu projekto permesas disvolvi privilegiajn rilatojn inter la membroj de la grupo kaj la dungita kandidato.

Unua provo, julio 2012



La unua dungita kandidato estas Adjevi, konata esperantisto el Togolando, kiu partoprenis al diversaj

internaciaj aranĝoj, kaj kiun mi renkontis en Vjetnamio. Li estas tre bona esperantisto, kaj bone konas la esperantajn movadojn. Li estis senlabora tiam.

Nun mi ĉiumonate ricevas informleteron el Afriko, kaj regule retrevuon *Babilanto-n*. Tiel mi nun scias kio okazas en Afriko, precipe en Togolando sed ankaŭ en franclingvaj najbaraj landoj.

Novaj provoj

Post ses monatoj, ni ĉiuj kontentis pri la situacio, kaj la membroj de la grupo kaj la dungito. Pro tio, jam nova grupo naskiĝis, «Esperanto Plus Malagasio». Aliaj venus se membroj aliĝus. Estas projekto «Esperanto Plus Tanzanio» kiu ankoraŭ ne povas konkretiĝi pro manko da personoj en la grupo. Se vi interesiĝas pri tiu projekto, bonvolu kontakti min kaj mi donos al vi la retadreson de Jean-Pierre, kiu kunordigas la tutan aferon.

Véronique

Cinquième Congrès Africain d'espéranto **29 décembre 2013 au 4 janvier 2014 à Cotonou (Bénin)**

Savez-vous que parmi les 70 associations nationales de l'UEA, 17 sont africaines ? Il existe des mouvements très actifs sur ce continent.

Peut-être les occidentaux n'en ont-ils pas suffisamment conscience, car très peu d'espérantistes africains réussissent à venir à des congrès en dehors de l'Afrique, à cause de problèmes de visa. La solution est donc d'organiser un congrès en Afrique même.

Quatre congrès se sont déjà déroulés en Afrique, mais le dernier a eu lieu en 1995...

Voici le temps du cinquième !

Mais, pour qu'il puisse se dérouler, les organisateurs ont besoin d'argent, essentiellement pour permettre aux espérantistes africains de venir à Cotonou....

Espéranto-France le collecte auprès de vous....

Votre contribution aidera à

- la venue d'au moins une personne de chacun des 17 pays africains ayant une association en relation avec l'UEA
- l'organisation d'une réunion (physique) de la Commission Africaine de l'UEA
- la rencontre d'espérantophones de différents pays d'Afrique et d'espérantophones venus du monde entier

En bref, **au succès d'un véritable congrès africain !**

Envoyez vos dons à :
Espéranto-France
4 bis, rue de la Cerisaie
75004 Paris

en précisant "pour le succès du congrès africain 2013"
Un reçu de déduction fiscale vous sera adressé.



Seiki kaj Collin japana kaj franca pentristoj de la 19a jarcento

En parko Ueno en Tokio troviĝas la domo por la memoro de japana pentristo KURODA Seiki, kiu havis grandan rolon en la enkonduko de franca Impresionismo al Japanio. Meze de la domo oni povas admiri lian ĉefverkon ” Apud lago ”



Tiu pentraĵo estas unu el la plej konataj artverkoj en Japanio. En la pentraĵo lia edzino Teruko havas ventumilon enmane vestita en blua kimono, sidante sur la ŝtono sur la bordo de lago. Seiki bezonis unu monaton por finpentri tiun pentraĵon en Hakone en la gubernio Kanagawa. Li naskiĝis en la gubernio Kagoshima la 9an de aŭgusto en 1866.

Li estis adoptita de sia onklo (frato de patro Kiyotsuna) en 1871 kaj iris al Tokio por vivi kiel knabo en la domo de Kiyotsuna en 1872.

La domo estis vasta, 2100 kvadratmetroj, kaj li povis vivi agrablan vivon tie. Li estas konata pro sia feliĉa vivo. Li atingis sian dekan jaron kaj eklernis unue la anglan kaj poste la francan. Li sukcesis esti akceptita de fremdlingva lernejo, kiam li havis 17 jarojn. Li lernis la francan por studi juron, ĉar tiutempe japana ŝtato imitis la francan juran sistemon, kiam ĝi ordigis civilan leĝon. La ŝtato sendis lian bofraton al la franca vic-ambasadorejo, tial kuniris Seiki, kiu forte deziris iri al Francio por lerni juron en 1884. Li loĝis en Francio dum 9 jaroj.

Sed li ŝanĝis sian decidon. Li decidis ĉesi lerni juron kaj eklernis pentradon sub la gvido de franca akademia pentristo Raphaël Collin (1850-1916). Kial li ĉesis la lernadon de juro?



Portreta pentraĵo pri Kume keiichiro (1889)

Li renkontis alian pentriston Huji Masazo kaj pentraĵ-vendiston Hayashi Tadamasa en la japana vic-ambasadorejo, kaj tiuj artistoj, kiuj konstatis lian talenton, forte rekomendis al Seiki fariĝi pentristo.



Pejzaĝo de Parizo (1890)

Li skribis sian decidon al la adoptinto Kiyotsuna, sed ĉi-tiu

estis dumvive kontraŭ lia deziro. Ankaŭ Huji lernis pentradon en la ateliero de Collin, kaj tio influis lian selektadon de instruistoj. Collin ŝatis japanajn aferojn kaj kolektis japanajn "biombojn" (japanaj rigardo-ŝirmiloj ĉefe uzataj kiel ornamaĵoj), ceramikaĵojn, noajn maskojn ktp. Oni diras, ke Collin iam ridete diris, ke li estas amanto de japanaĵoj.



Morta kampo (Grez) (1890)

Tiu japaneco altiris la japanajn pentristojn al li. Seiki akiris kapablon por pentri pejzaĝojn, figurojn, nudojn ktp dank'al Collin. Li ankaŭ lernis kiamaniere pentri helajn pejzaĝojn kun la sunradioj kaj enkondukis delikatuŝan pentr-manieron en la japanan pentristan mondon.

Midori Matsumoto

AVERTISSEMENT

Nous publions les deux premières pages de « Iuj paŝis sur la Luno », traduction des aventures de Tintin « On a marché sur la Lune ». Il s'agit de maquettes artisanales qui n'ont, évidemment, pas la qualité du futur album. Nous espérons le faire publier par les éditions Casterman l'année prochaine. Toute copie et diffusion de ce document est interdite pour préserver les droits des Editions Casterman. Nous espérons que la parution de ces planches vous donnera envie d'acheter l'album. Vos remarques seront, bien sûr, les bienvenues.

AVERTO


Ni publikigas la du unuajn paĝojn de "IUJ paŝis la Luno" traduko de Tinĉjo "On a marché sur la Lune." Tiu maketo ne havas, kompreneble, la kvaliton de la estonteca albumo. Venontajare, ni esperas eldoni ĝin per Casterman Eldonoj. Ajna kopiado kaj dissendo de ĉi tiu dokumento estas malpermesita por protekti la rajtojn de Casterman Eldonoj. Per la publikigo de tiujn bildostriojn, vi volas instigi vin aĉeti la albumon. Kompreneble, viaj komentoj estos bonvenaj.

Ciujn monatojn eblos legi novan paĝon...



IUJ PAŜIS SUR LA LUNO

El la atoma serĉada centro de Sbrodj, en Sildavio, ĵus ekiris la unuan lunan raketon kiu kunportas Tincjo, Milu, kapitano Hadoko, profesoro Sungirul' kaj inĝeniero Volf (1). La radio obligas siajn vokojn al raketaj pasaĝeroj forĵetitaj en la spacon. Oni anksie atendas ke la ekspedicia membraro vekigu de la ekira senkonsciigo sed la radioricevilo de la observatorio kies anteno staras en la nokto, ricevas neniajn respondojn...



Ha lo, ha lo, ĉi-tie la Tero.... Luna raketo respondu... Ha lo ? Ha lo ?.....



Ho Dio, se ni erarus en niaj kalkuloj !... Tio estus terura !


Ha lo, ha lo, luna raketo ?...



Dume, forze, nekonatuloj ankau ankultadas.

Ha lo, ha lo, luna raketo respondu...

Fiaĉajo por ni, diable, se ĉiu estus mortita ĉi ene !



(1) Vidu : Celo la luno

Information sur les Projets Grundtvig

Les Projets Comenius sont réservés aux Collégiens et Lycéens, les Projets Erasmus aux Etudiants et les projets Grundtvig à l'éducation permanente des adultes.

N. F. S. GRUNDTVIG (1783-1872) Seul éducateur danois de stature internationale, il fut aussi un théologien, un historien et un écrivain qui exerça une profonde influence sur la vie de son pays. Très attaché à la préservation du patrimoine il défendit ardemment l'éducation des adultes en tant que vecteur de participation sociale et de développement personnel.



Programme pour l'éducation et la formation tout au long de la vie

L'Union Européenne subventionne des projets très divers, proposés par des organisations variées et les candidatures sont à déposer auprès des agences nationales.

**« Les partenariats éducatifs Grundtvig sont destinés à promouvoir des projets de coopération de petite envergure, entre au moins trois organismes européens travaillant dans le domaine de l'éducation pour adultes, au sens le plus large du terme.*

Les partenariats éducatifs sont axés sur le processus même de coopération et visent à accroître la participation des structures soucieuses de donner une dimension européenne à leurs activités éducatives. Les partenariats éducatifs sont d'une durée de 24 mois non renouvelables »

IDEO Éducation interculturelle : un défi pour l'Europe



un projet Grundtvig

Partenariats éducatifs : La France a été acceptée et dans ce thème « Education Interculturelle : un défi pour l'Europe de la diversité » avec 3 pays partenaires acceptés par leurs agences respectives- L'Allemagne, la Catalogne et la Suisse, d'août 2011 à juillet 2013. Lors des différentes rencontres, les partenaires se sont efforcés de construire des ponts entre différentes cultures, de collecter, de recenser et d'améliorer les meilleures pratiques, de rendre possible une participation active au niveau international et de mettre en relief à

la fois la dimension européenne et la qualité universelle des activités de chacun.

Vous aurez un aperçu du travail réalisé à ce jour sur le site www.noos.ch/ideo- ce site rassemble les documents réalisés et décrit les activités du partenariat en cours. La revue d'Espéranto-France, le Monde de l'Espéranto publie des informations. Le site et autres documents seront produits en 4 langues, allemand, catalan, français et espéranto.

** Volontariat Sénior a pour but de permettre à des séniors de se porter volontaire dans un autre pays européen pour y pratiquer une activité bénévole sous la forme d'apprentissage informel et mutuel (apprentissage et partage de connaissance) Dans ces projets, les volontaires pourront augmenter leurs connaissances personnelles, linguistiques, sociales et interculturelles, acquérir des compétences spécifiques liés aux activités accomplies. Les volontaires peuvent partir pour des durées de 3 à 8 semaines.*

Vous pourrez également découvrir le projet auquel j'ai participé, proposé par la Fédération Italienne d'Espéranto (FEI) pour faire connaître et enseigner l'espéranto à Mazara del Vallo- en Sicile :

Des revues comme le Monde de l'Espéranto, Espéranto-Info, Esperanto (UEA) ont publié des rapports écrits à mon retour et vous pouvez suivre l'évolution de l'enseignement de l'espéranto dans la ville de Mazara del Vallo en consultant le site www.esperanto.it/cei et vous découvrirez la mise en place d'un projet Comenius- pour Collégiens et Lycéens.

Raportis Monique Arnaud

Plus d'information sur le site : www.europe-education-formation.fr/grundtvig.php

Par courrier : Agence Europe-Education-Formation France (2E2F) 25, quai des Chartrons

33080 Bordeaux Cedex

33080 Bordeaux Cedex

Par téléphone

Standard: 0556009400 Horaires d'accueil téléphonique : 9h - 12h30 et 14h - 17h

Par fax

05 56 00 94 80

* les textes en italiques proviennent du site de présentation de l'Agence (2E2F)



Aŭskultu... PATRIC



Unika artisto, Patric estas unu el la plej famaj okcitanlingvaj kantistoj, kun kantaro kiu miksas popularajn okcitanajn kantojn kun adaptaĵoj de eksterlandaj sukcesaj, kaj liaj propraj komponaĵoj. Komence de sia kariero, li kantis kun Georges Brassens, Barbara, Mouloudji, Claude Nougaro, Yves Duteil, Lluís Llach, Pi de la Serra. Tom Paxton rekonis lin digna heredanto de la usonaj protestkantistoj.

En la UK en Montpellier en 1998, Patric allogis la esperantistan publikon, kaj denovan fojon okaze de la Franca Nacia Kongreso (IREM) en Sète en 2011. Post tiu kongreso naskiĝis la ideo pri albumo en esperanto uzante la kantojn de Patric tradukitajn en esperanton de André Andrieu, adaptitajn de Ludmila Novikova, kaj eldonitajn en Rusio en broŝuro titolita *Okcitanaj kantoj en esperanto*.

La albumo Okcitanio prenas 15 titolojn el la kantaro de Patric aperintajn en liaj okcitanaj albumoj; temas pri populara & tradicia okcitana repertuaro kaj ankaŭ propraj komponaĵoj. Li akompanigas sin per ĉiuoriginaj altkvalitaj muzikistoj en ĵazo, tradicia, roko, romaa, populara, salsaon, mondmuzikon, ktp. La projekto efektiviĝis laŭ la arta direktado de JoMo (J.M. Leclercq). La korusaĵoj estis registritaj de korusa grupo de geesperantistoj el Tuluzo kaj Arieĝo. Inter la elektitaj kantoj: la famega "*Se canta*" (ĝi kantas) kara al okcitanoj, kaj "*Kastelorizo*", kanto dediĉita al lia forpasinta avino, kiu estis grekino, precize de tiu eta greka insulo Kastellórizo. Patric estas moderna trobadoro kiu vojaĝas tra la tuta mondo kun siaj kantoj.



Aĉetebla ĉe : <http://vinilkosmo.com/vko/shop.php?lng=e>

JOMO partecipa al Festival du Roc Castel au Caylar (le 27 juillet à 21h30).

Cet éco-festival, organisé par Hubert Martin propose l'éloge du voyage lent, à travers des rencontres de voyageurs, récits de voyages au café des voyageurs,...

Du samedi 28 au mardi 31 juillet (tout est gratuit !)

